

Numero: 278.
Julio: 2015.

23-a jarkolekto

Literaturaj Folioj

VESPERTO



Redaktanto
Apáti Kovács Béla
Kaposvár, Béla király u. 44. HU-7400
Telefona: 06/20/497-03-64
Retadreso: apatikb111@gmail.com
Eldonanto: KAPOŠVARA ESPERANTO-CENTRO
Lingve kontrolis: Erzsébet Tuboly

Homoj, kiuj vivas en Suno

Terglobo falis en Sunon. Ĉirkaŭ ni ĉio bolas kaj brulas. Neniu scias, kio okazos morgaŭ kaj postmorgaŭ. Ni nur esperas, ke la tragedio estos evitebla.

Malfermu viajn okulojn kaj vi ekvidas, kio okazas ĉirkaŭ vi.

Diru al mi sincere, ĉu vi scias la respondon je tiuj ĉi teruraj problemoj. – Laŭ mi ne. – Neniu scias la respondon. Ne ekzistas politikisto, kiu nun scius, kion fari en tia danĝera situacio.

Mi, kiel esperantisto, mi kompatas la rifuĝintojn, se ili estas vere en danĝero, ke ĝi ne estas la parto de tiu ĉi „granda” sceno aranĝita en la fono.

Kiuj direktas la rifuĝantojn? Kial ĝuste nun ili alvenas al Eŭropo amase? Militoj kaj hombuĉadoj ankaŭ en la pasinto okazis en Afriko kaj Azio, eĉ en la tuta mondo. Ĝis nun tiuj malfeliĉaj homoj ne entreprenis tian longan migradon.

Interese ili ne deziras iri al Ameriko kaj Aŭstralio. Certe nun vi diras, tiuj ĉi kontinentoj estas tro malproksime.

Vi pravas. Sed ekzistas sekuraj landoj ankaŭ pli proksime. Oni ne devus riski vivon travojaĝinte maron kaj dezertojn.

Krome ankaŭ en Eŭropo ne ĉie estas brila vivo. Eŭropo ne estas tiel, kiel antaŭ jaroj aŭ jardekoj. Ĉie estas malriĉuloj kaj malfeliĉuloj. De tago al tago estas pli malmultaj laborlokoj pro la migrado. Ankaŭ el la malriĉaj landoj de Eŭropo homamasoj serĉas laboron, pli bonan vivkondiĉon en la pli evoluintaj kaj pli riĉaj landoj de Unio.

Ni staras ĉe la sojlo de giganta tuttera katastrofo kaj mi timas, neniu scias pri tio la medikamenton. Fine la tuta homaro forbrulos falante en Sunon.

Estus bone, se ni jam efektive lernus el la tragedioj de la pasinto. Ni ne forgesu, la homaro jam travivis similan, sed tiam ankoraŭ ni saviĝis en la lasta momento.

Ĉu ankaŭ nun ni havos bonŝancon?

-Redaktanto-



Salut', amiko!

-Salut'!

-Estu salutate! Kion vi deziras? Mi ne konas vin. Ĉu ni jam renkontiĝis iam? Mi ne memoras.

-Ne. Ni neniam renkontiĝis. Mi nur ekvidis vin kaj mi salutis. Ĉu tio estas problemo?

-Ne estas probleme. Nur strange, ke vi vokis min nekonate. Kio okazus en grandurbo, se ĉiu salutis unu la alian? Estusabela lingvokonfuzo. Oni ne havas tempon por tio. Ĉiu rapidas, kuregas. Vespere oni ĝojegas, se oni povas ekriprozi en sia hejmo. Ankaŭ mi ne havas tempon fari novajn kontaktojn. Vidu, mi droniĝas en laboron! Mi ne komprenas, kial vi salutis min? Ĉu vi estas tempomilionulo?

-Pardunu min, amiko!

-Ĉu amiko?

-Jes, amiko.

-Ja, mi ne konas vin kaj ankaŭ vi min. Ĉu ne?

-Tio ne gravas. Vi kaj mi estas homoj kiuj vivas sur tiu ĉi planedo.

-Ĉu tio ĉi rajtigas vin nomi min amiko? Interese. Mi ankoraŭ ne aŭdis pri tiu ĉi afero. Mi ne scias, eĉ vian nomon

-Kio ŝanĝigos, se oni nomos min Petro aŭ Johano? Ĉu nomo diras ion al vi? Mi vidas, ke vi estas homo, mia homfrato kaj mi salutis vin.

-Ĉu mi estas via homfrato? Frato?

-Jes, frato. Ni ambaŭ vivas sur Tero. Ni estas teranoj kaj ni apartenas unu al la alia. Ne diru, ke mi parolas stultaĵojn, ĉar mi esploras.

-Vi estas frenezulo. Lasu min! For de mi!

-Amiko, ne parolu tiel! Vi malgajigis min. Mi nur salutis vin.

-Mi ne bezonas viajn salutojn. Kiel mi jam diris, mi ne havas tempon.

-Tempo! Tempo! Ĉu simpla saluto bezonas tempon? Sufiĉus diri nur mallonge „Salut', amiko!” Se ĉiu dirus nur tiun ĉi frazeton, kredu ankaŭ la mondo estus pli bona. Mi petegas ne estu tiom kolerema. Nur diru mallongan frazeton: „Salut', amiko!” Ĝi ne estas granda afero. Kredu min, per ĝi la mondo estos pli bela. Mi garantias al vi, tiu ĉi frazeto ne forrabos de vi tempon, eĉ ĝi donacos al vi eksterordinaran travivaĵon.....

-Policisto! Policisto, tiu ĉi frenezulo ne lasas min trankvile! Help'! Help'!

-Ŝaŝa-



Aventuroj sur Lumo

-Verkis: Apáti Kovács Béla-
XIII-a

En la sekva momento la onklino Izabela malaperis, kvazaŭ ŝi neniam estus tie.

Ĉu tio estas sorĉo aŭ li jam frenezigiĝis? – Johano tion ne sciis. Li staris tie tute frakasite kaj li prenis sian kapon.

Liaj okuloj malheliĝis kaj la salono turnis kun li. Li volis kriegi, sed voĉo ne povis forlasi siajn lipojn. Li nur kvakadis per la buŝo kaj li apenaŭ ricevis aeron.

Li devis sidiĝi sur la proksiman seĝon.

Li denove estis sola en la salono. La muziko silentiĝis kaj sekvis terura atendado. Denove li atendis kaj je ĉiu eta signo, bruo li tremiĝis. Li ektimiĝante ĉirkaŭrigardis kaj serĉis de kie venis la bruo.

Pasis longaj minutoj, kiam la pordo malfermiĝis. Johano jam timis rigardi tien. Li pensis, ĉio estas nur sonĝo. Tra la pordo venas fantomo kaj ne homo.

Fine vole nevole li ĵetis rigardon al la direkto de pordo. Li preskaŭ svenis pro la vidaĵo. Tie staris Elizabeto en florfigura, belega robo. Ŝia blonda hararo milde falis sur ŝiaj graciaj ŝultroj.



Johano restis senmova, ĉar li pensis, ke ankaŭ ŝi estas iluzio. Li vidas fantomon, kiel antaŭ nelonge, kiam ekaperis lia onklino Izabela. Kiom li ĝojegis tiam. Li pensis, la onklino alportis al li la liberiĝon. Estis tre doloriga la rekonscio, ke kion li vidis kaj spertis ĉio estas trompo por misgvidi lin.

Li ekkriis panike kaj retroiris kvazaŭ li dezirus rifuĝi.

-Elinjo, mi ne volas vin! For de mi! Ankaŭ vi estas fantomo, kiel mia kara onklino Izabela. Kial vi faras tiun ĉi teruraĵon por mi? Kio estas mia kulpo, ke mi estas tiel torturita?

Li ne ricevis respondon. La virino proksimiĝis al li kaj jam preskaŭ ŝi atingis Johanon. Ŝi etendis siajn brakojn al la viro.

-Mi estas Elinjo. Ne timu, mi ne estas fantomo. Ĉio antaŭe estis nur sonĝo, malbona sonĝo. Trankviliĝu, kara! Vi estas savita. Ekvidu, nun jam ĉio estos en ordo.

Johano estis senkonsila kaj li nerveze rigardis jen al la virino jen al la pordo. Ŝajnis, ke li vere timas. Liaj nervoj jam estas tute frakasitaj.

Kiam la brakoj de Elinjo tuŝis la bruston de Johano, li ektemis. Li sentis, kiu tuŝis lin, tiu estas karnosanga estaĵo.

Ĉu efektive ŝi estus Elinjo? Li longe hezitis ĝis li elbuŝiĝis:

-Ĉu vi estas vere, Elinjo? Eble baldaŭe ankaŭ vi malaperos, kiel mia kara onklino.



-Ne timu! Mi estas Elinjo. Mi tre kompatas vin pro la okazintaĵoj. Eble ankaŭ mia kulpo, ke tio ĉi okazis, sed jam mi ne povas refari. Nu, ni iru!

Johano ne kredis la aŭditajn vortojn. Li plu retroiris en la salono serĉante lokon, kie li povintus defendi sin.

-Johano vi timas de mi – ekploris Elinjo. – Ĉu vi akuzas min pro via sufero. Mi bone scias kiom multe vi suferis. Mi ege bedaŭras. Ĉu vi povas pardoni al mi?

-Ĉu pardoni al fantomo? – ekkris, kiel frenezulo Johano. – Vi ne estas homo. Vi estas monstro.

Ĝi tre surprizis la virinon. Ŝi tute paliĝis. Elinjo haltis kaj sidiĝis kaŝante ŝian vizaĝon en la manplatojn.


Ili estis duope en la salono. Krom ili neniu estis tie.

Du homoj, kiuj antaŭ tagoj kune amuziĝis kaj esperis, felice ili pasigos la ferion. Sed nun ĉio malboniĝis. Ĉu ankoraŭ por ili Suno ekbrilos aŭ la estonto ĉiam estos frosta.

Estus bone kredi, ke ankoraŭ la mondo ŝanĝiĝos ĉirkaŭ ili kaj ili denove amos unu la alian.

En tiu ĉi momento Johano ne sciis la respondon.

(- daŭrigota -)



Poezio

Kio estas poezio? – Laŭ mi, ĝi estas ĉiela nektaro glutante el la antaŭtuko de la anĝeloj.

Nuntempe estas mode ne legi poemojn, versojn. Pli agrable rigardi filmon en televido aŭ rigardaĉi la ekranon de komputilo.

Mankas elstaraj, efektive grandiozaj poetoj.

Ĵurnaloj nur malofte ĝojigas nin per versoj. Krom kelkaj literaturaj gazetoj, revuoj ni apenaŭ povas legi poemojn.

Homojn jam ne interesas tiu ĉi literaturaĵo. Sed tiu ĉi paĝo estu escepto kaj legu la sekvajn versojn de fama, hungara esperantista poeto!

EMBA Emeriko Baranyai 1902—1961



TIAM

Tiam, antaŭlonge mi luliĝis
en nebulaj revoj de infan';
tie onde ortritrik' ruliĝis,
buntis papaveto kaj cejan'.

Tre malvastis tiam mia mondo.
Meze staris alte la kastel'.
Ĝia parko, kien gvidis ponto,
estis kaj tabuo kaj mister'.

Sed, mister' intima, tie zumis
la arbar' fabelojn al la knab',
kaj la kampojn timian' parfumis,
loĝis papilio kaj skarab'.

Mond' malvasta, sed sen elĉerpeblo:
folaj kapro, serioza bov',
formikujo, frambo inter vepro —
ĉiutage ia nova trov'.

Ĉio ravis min, eĉ la kabano
por mi estis de alloga bel':
tie min ja vartis panja mano,
kaj enlulis panjo per fabel'.

La dezir' jam estis plenumiĝo
kaj mi eĉ ne sciis pri l' esper',
jes, ĉar al mi estis jam feliĉo

gapi al la stelo de vesper'.

Tiel vivis mi en mondo paca,
nur pri tio miris sen kompren',
kial sur vizaĝ' de l' patro laca
tiom oftas muta malseren'.



Nur unufoje

Mi volus sole unufoje
la ĝustan tempon koni,
kiam komencas dio ĝoje
feliĉon jam disdoni.

Kaj volus mi kun la hastantoj
en ĝusta tempo veni,
kaj foje da donacoj diaj
nur etan sakon preni.

Sed ĉiam mi malfruas, vane
pro kur' min ŝvito lavas,
se dio tiel larĝamane
malŝparan emon havas.



Tago el mia vivo

Dumnokte: steloj, steloj,
steloj,
sopiraj sonĝoj, fe-kasteloj.

Matene: kuro post fortuno;
kun nova suno nova nuno.

Dumtage: ŝvito, vana ago;
kun nova tago nova plago.

Jen ree mortis viv-espero,
mi sidas stulte en vespero.



Por infanoj

Fratoj Grimm

Tri fratoj



Estis iam viro, kiu havis tri filojn. Krom la domo, en kiu li loĝis, li posedis nenion. Ĉiu el la filoj dezirus heredi ĝin, sed la patro amis ĉiujn same kaj li ne sciis, kion fari por ne esti maljusta; plej simple estus vendi la domon kaj dividi la monon, sed li ne volis tion fari, ĉar ĝi estis hejmo de liaj patroj kaj prapatroj. Fine li trovis rimedon kaj diris al la filoj:

"Iru en la mondon, provu viajn kapablojn kaj ĉiu lernu metion; kiam vi revenos, tiu ricevos la domon, kiu faros plej bonan majstroverkon."

La filoj konsentis. La plej aĝa decidis fariĝi forĝisto, la dua barbirò, la tria skermisto. Ili difinis la tagon de la reveno kaj foriris.

Feliĉe ĉiu trovis bonan majstron kaj plene ellernis sian metion.

La forĝisto subforĝis la ĉevalojn de la reĝo kaj pensis:

"Farita estas la afero, la domo estas via."

La barbiro razis nur altrangulojn kaj pensis la samon. La skermisto ricevis multe da batoj, sed li kunpremis la dentojn kaj ne ĉagreniĝis, ĉar li pensis:

"Se vi timos batojn, vi neniam ricevos la domon."

Kiam pasis la difinita tempo, ili revenis al la patro; sed ili ne sciis, kiamaniere trovi plej bonan okazon por montri sian arton, sidis kune kaj interkonsiliĝis. Subite ili ekvidis leporon, trakuranta la kampon.

"Jen ĝi venas kvazaŭ invitita," diris la barbiro, prenis sian pladeton kaj sapon, ŝaŭmigis ĝin, ĝis la leporo proksimiĝis, poste dum ĝia kurado sapumis ĝin kaj razis ĝian barbon: li ne vundetis ĝin, nek kaŭzis doloron.

"Tio plaĉas al mi," diris la patro, "se viaj fratoj ne estos pli lertaj, la domo estos via."

Post momento galope preterveturis sinjoro en kaleŝo.

"Nun vi vidos, patro, kion mi scias," diris la forĝisto, kuris al la kaleŝo, deŝiris de la galopanta ĉevalo la kvar hufoferojn kaj alnajlis kvar novajn.

"Brave," diris la patro, "vi ne estas malpli lerta ol via frato; mi ne scias, al kiu mi devas doni la domon."

La tria diris:

"Permesu ankaŭ al mi montri mian arton."

Ekpluvis, la skermisto eltiris la spadon kaj eksvingis ĝin super la kapo: neniu guto falis sur lin. La pluvo pligrandiĝis kaj fine la akvo fluis kvazaŭ el kuvo: la skermisto svingis la spadon pli kaj pli rapide kaj restis tute seka kvazaŭ sub tegmento.

Ekmieregis la patro, vidante tion kaj diris:

"Vi faris plej bonan majstroverkon, la domo estas via."

La du aliaj akceptis la verdikton sen protesto. Ĉar ĉiuj tri amis unu la alian, ili restis en la domo kaj ĉiu laboris en sia metio; kiel lertaj specialistoj ili havis grandan klientaron. Ili vivis feliĉe ĝis maljuna aĝo, kaj kiam unu malsaniĝis kaj mortis, la du aliaj tiel ĉagreniĝis, ke ankaŭ ili malsaniĝis kaj mortis. Ĉiujn tri, ĉar ili estis tiel lertaj kaj tiel amis unu la alian, oni metis en unu tombon.



Dezerto

Dezerto

